

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 517

NOVEMBRO 1948

ARBOJ DE LA ARBARO KAJ KAMPO

de FRANK BOOTH

Kun 15 belaj ilustraĵoj de Edith R. Turlington

Prezo : 1 ŝil. 10p. aŭ 7 respondkuponoj, aŭ frankite.

“Antaŭ iom da tempo mi ricevis por recenzo libron, kiu tre ĝojigis min. Temas pri traduko el la angla lingvo de malgranda broŝuro pri kelkaj el la plej oftaj en Anglujo arboj. Nek la grandeco de la libro, nek la amplekso de la temo, nek la prezo min ravis. Sed la zorgemo kun kiu la traduko estas farita, kaj la arteco de la preso kaj ilustraĵoj. La libreto enhavas parton el tiuj vortoj, kiujn ni renkontas en niaj kutimaj lernolibroj pri botaniko. Ni devus scii ilin en Esperanto. Sed ĉu ni vere scias? Tia libro estas paŝo sur la vojo al esperanta kulturo, kaj ĝi estas inda ke oni ĝin lernu preskaŭ parkere. Oni devas bone atenti por povi trovi preterprenon. Tiuj 40 paĝoj en malgranda formato estas perleto.

Svenska Esperanto Tidningen.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LIMITED.

Mendu ĉe ĝia agentejo en via lando aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Fr. Svačina, Lanžhot, Ĉeĥoslovakujo, koresp. kun tuta mondo pri jenaj temoj : (1) Bredado de senkornaj kaprinoj, laŭ plej moderna metodo. (2) Pri tuta homa vivo de naskiĝo, ne nur ĝis morto.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Filatelistoj el ĉiuj landoj! Ĉu vi estas fervoraj kolektantoj? Bonvolu peti informojn pri Madejra Filatela Klubo. Skribu multnombre al prez. : D-ro J. C. Tavares da Silva, Rua do Aljube, 49, Funchal, Madeira.

Tre deziras aĉeti kaj pagos malavare por ekzempleroj de unuaj esperantaj broŝuroj, jaroj 1887 ĝis 1892, Esperantista familio Chomette, 8525 Saturn Street, Los Angeles 35, Calif., Usono.

Poŝtmarkinterŝanĝon tutmonde deziras A. Bengtsson, Box 461, Borås, Svedujo. Faru pm-sendaĵon kaj mi sendos samvalorajn.

Filatelistoj! Ofertas : tuta mondo. Deziras : Belgujo, Luksemburgo, Francujo, Italujo, Ĉeĥoslovakujo, Slovakujo, Skandinavio. Bazo : Yvert 1947 aŭ 49 kaj Zumstein 1948. A. W. Withoos, Venkelstraat 15, Eindhoven, Nederlando.

Juna Anglo deziras korespondi kun ĉiuj landoj. S-ro Alan P. Brain, 26 Horfield Road, Bristol 2, Anglujo.

S-ro Liam Cullen, 84 Strand St., Skerries, Co. Dublin, Irlando, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn.

Ni donos premiojn de libroj kaj gazetabonoj al ĉiu, kiu konigos nian programon al ĥoro aŭ danctrupo. Apartaj premioj por belaj kaj gravaj salutoj. Petu detalojn kaj programon de IIIa Internacia Muzikfestoj, Junio 1949. Sek-ino, Ponciau, Wrexham, Britujo.

Deziras sciigojn pri leĝoj kaj hospitaloj koncernantaj kriplulojn D-ro Rousseau, 2 rue Chef-de-Ville, Angers, Francujo.

I.D.E.O. (Ipswich and District Esperanto Organisation) aranĝos vesperon de ilustritaj poŝtkartoj en Januaro. Respondo garantiata. Sendu amase al I.D.E.O., c/o 74 Dales View Road, Ipswich, Anglujo.

Mihaelo Slivka, Branka Bajića 34, Novi Sad, Jugoslavujo deziras interŝanĝi neuzitajn aŭ uzitajn kompletajn seriojn de poŝtmarkoj kun Eŭropaj landoj.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj, egalan kvanton, aŭ laŭ via deziro John Goldsmith, Esperanto House, Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

ekzistas 10 jarojn. Tiuokaze aperis 16-p. ilustrita propaganda broŝuro, kiu enhavas detalajn informojn pri la estiĝo kaj disvolviĝo de T.J.O. kaj Denaska Esperantistaro, statuton de T.J.O., kaj liston de perantoj. Ĉiu, kiu vere interesiĝas pri la junular-laboro nepre mendu la broŝuron ĉe

TJO-CENTRO

West Graftdyk, Nederlando

Prezo : 5 pencoj aŭ 1 int. resp. kupono

La sekcio Harlema de L.E.E.N. aranĝos propagandan keston, kaj pro tio ĝi petas la eksterlandajn Esperantistojn sendi al ĝi prospektojn, gvidlibrojn, gazetojn, k.t.p. N. Vergunst, Trompstraat 69, Haarlem, Nederlando.

Instruisto Hvorslev, Asylvej 1, Risskov, Danujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Rifuzas bagatelaĵojn.

Interŝanĝas neuzitajn pm. kun Angloj kaj Usonanoj S-ano V. Todorov, Borica 8, Sofia, Bulgarujo.

Letervesperon 15an Decembro, kaj poste ekspozicion, aranĝas Esperantista societo, Gorna Oreĥovica, Bulgarujo. Ni atendas amason da korespondaĵoj ; respondo garantiata ankaŭ al postdate ricevotaj komunikaĵoj.

S-ino instruistino deziras korespondi poŝtkarte aŭ letere. Marion Perry, 54 The Downs, Herne Bay, Kent, Anglujo.

Prestwich Esperanto-Grupo okazigas letervesperon 20an de Decembro kaj certigas respondon al ĉiu sendanto. "Nia Hejmo", Butterstile Lane, Prestwich, Lancs., Anglujo.

Lokomotivestro en Aŭstralio deziras korespondi kun fervojistoj en la tuta mondo. R. W. Perry, 93 Henry Street, Tighes Hill, Newcastle, Aŭstralio.

Dussart Camille, Morialme, Namur, Belgujo, deziras korespondi tutmonde kun gesamideanoj per il. pk., ankaŭ interŝanĝas pm., krome deziras ricevi gazetojn, broŝurojn, k.t.p. por propagando. Certe respondos.

Pola studento volas korespondi kun fraŭlinoj kaj fraŭloj tutmonde. E. Ostrowski, Zymievskego 11, Lowicz, Polujo.

Onnik Sogomonjan, Dr. Nider 5, Burgas, Bulgarujo, deziras korespondi kun filatelistoj en esperanta, germana, kaj itala lingvoj.

Paco kaj Justeco, sekcio en Bruĝo de Flandra Ligo Esperantista, ŝatus ricevi por sia verda kabaredo "La Bruĝaj Piratoj" tekstojn de mallongaj sed spritaj teatraĵetoj. Kiu disponigas taŭgajn programpunktojn por varieca vespero? Ni estas pretaj pagi honorarion. Sendu ĉion al "Paco kaj Justeco", Nieuwstraat 54, Assebroek, Belgujo.

DENOVE HAVEBLA

ZAMENHOF- RADIKARO

EUGEN WÜSTER

kun derivaĵoj kaj fontindikoj

Prezo : 6 ŝil., aŭfranko 3p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERATISTA

41a JARO Novembro 1948

N-ro 517 (II)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj
estas permesataj, kondiĉe ke oni
citu la fonton. Por bibliografia
celo oni sendu periodaĵon en kiu
aperas represo el ESPERANTO,
al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTA-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £5 : ½ paĝo 50 ŝil.
¼ paĝo 25 ŝil. : ⅛ paĝo 12.5 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

LA FEDERALISMA SAVILO

Kio frapas pleje la pripenseman civitanon de la nuna epoko, estas la konstato, kiom malmulte ideoj ĝenerale akceptitaj estas praktike aplikataj. Ke milito estas malprofita negoco, eĉ por la venkinto, montris per trafaj ekzemploj tiu batalanto por paco, Norman Angell, en sia ankoraŭ nun leginda verko *La Granda Iluzio* aperinta en trideko da lingvoj. La grandioza agado de la batalantoj por paco per rajto (leĝo), iliaj grandparte akceptitaj ideoj kaj konkludoj, ne kapablis malokazigi du militegojn. La kutima kolorigado jen nigra jen blanka, neniel sufiĉas komprenigi, kial povis kaj povas okazi tiaj katastrofoj.

Unu elemento, eble la plej grava, kiu estas ĉe la origino de la tuta mizero, estas la homa inerto, la fatala kredo, ke sufiĉas akcepti ideon per la lipoj kaj ĉio iros bone. Elokventan pruvon pri ĉi tiu homa nesufiĉeco ni povas denove konstati nun en du tipaj ekzemploj.

La establiĝo de libera Hindujo supozigis, ke ĉi tiu duonkontinento estos ŝtataro formanta unu blokon vidalvide al aliaj landoj, interne organizitan laŭ federalisma principo. Ĉi tiu principo, aŭ pli bone principaro, entenas la memregadon, la toleron pri minoritatoj rasaj, lingvaj kaj religiaj, la respekton al la persono k.s. Kion ni nun vidas? Batalinto por la homrajtoj, Mahatma Gandhi, falis sub la kuglo de fanatikulo intelekta. La persekutado de malplimultoj en Hindujo prenis formojn eksterordinarajn eĉ en ĉi tiu tempo de regula eksterleĝigo. La intelektuloj hindaj, kiuj studis en Eŭropo, evidente nenion profitis el la spertoj bonaj kaj malbonaj, kiujn faris la eŭropaj popoloj.

La dua ekzemplo estas Palestino. Du gentoj interbatalas pri la posedo de ĉi tiu lando. Gigantaj interesoj materiaj staras en la fono de ĉi tiu batalado, malforte kaŝitaj per ideologia motivigo. Observanto, senpasie rigardante ĉi tiun malĝojigan spektaklon, demandas sin, kial reciproka cedo kaj eĉ ĝustatempa interveno de la Unuigita Naciaro ne povis fari ordon. Ni scias, ke tio estus kreinta la faman *Casus belli* inter la grandpotencoj interesitaj. Sed la plej proksime interesataj, judoj kaj araboj, ne sukcesis trovi la sole ĝustan vojon: tiun de libera konfederiĝo. La solvo el la nuna embaraso kun la tuja celo savi homajn vivojn kostis la vivon al Grafo Bernadotte. La fanatikismo homa, la primitiva besta instinkto, estis pli forta ol la voĉo de prudento kaj la volo limigi la propran postulon. Kaj estas groteskaĵo, ke precize anoj de gento persekutita dum jarmiloj, nun aplikas la metodojn de iliaj senkompataj ĉasistoj!

Kaj malgraŭ ĉio, la federalisma ideo iam venkos! Eble post multe da larmoj, ŝvito kaj sango. **Nur ĝi** estas la savilo el la kaoso. Ĝi ne kuracos ĉiujn mizerojn de la homaro, sed almenaŭ forigos unu el la kaŭzoj de konflikto.

Ni, anoj de la internacia lingvo, povas nur subteni la ideon federalisman. Ĝia momenta malsukceso komprenigu ankaŭ al la plendemuloj en niaj vicoj, ke la vojo al sukceso estas plena je ŝtonoj kaj dornoj.

H.J.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

En la *Imperio de la Mezo*, Ĉinlando, nia movado ne havas facile kultureblan grundon malgraŭ la ekzisto de bonaj lernolibroj kaj de energiaj laborantoj. Dum jardekoj Ĉinujo estas en stato de konstantaj konvulsioj, sociaj perturboj, eksteraj atakoj, milito, senfina fratemilito kaj laste kolosa inflacio. Estas do des pli salutinde, ke kelkaj fervoruloj klopodegas ĉiel teni alte la standardon. Al ili ni, Esperantistoj en pli bonŝancaj landoj, helpu per sendo de utila materialo, legaĵoj k.s.

En Foochow (Fuĉaŭ), la ĉefurbo de Fukien Provinco, aperis potenca propagandilo por nia ideo. Tio estas duŝemajna rubriko *Esperanto* en la ĵurnalo *Fugien Shbao*. Redaktoro estas S-ro Shen Zhen kaj la ĉefaj kontribuantoj estas S-roj C. Ĝolabio, Delegito de U.E.A. en Kantono, Eltunko, redaktoro de la Esperanta revuo *Ĵurnalisto*, kaj Sun Jun, la pionira Esperantisto, kiu pasintatempe tradukis multajn literaturaĵojn el Esperanto. Ĉi tiu rubriko klarigas la signifon de nia lingvo, montras la vojon kiel lerni ĝin, rekomendas Esperantajn literaturaĵojn kaj publikigas tradukitajn Esperanto-leterojn. Precipe tiuj lastaj plaĉas al la neesperantista legantaro. *Esperanto* estas plejparte ĉinlingva. Multaj artikoloj estas tradukitaj el la organo de U.E.A., ekzemple traduko de *Al la Tutmonda Esperantistaro* eldoniĝis en la dekunua numero. Ĝi nun havas multajn legantojn en Nankino, Ŝanhajo, Kantono kaj Ŝuan Provincoj.

* * *

De Brazilo ni ricevis ĝojigan sciigon pri la oficiala starigo de kursoj en Esperanto por la oficistoj de la Statistika Departamento en la ŝtato Santa Catarina. La dekretoj 44 kaj 45 de la citita departemento (Diário oficial de Estado de Santa Catarina, No. 3735, 2 de Julho 1948) fiksas detale la kondiĉojn de ĉi tiu kurso el kiuj ni resumas la ĉefajn detalojn.

En la dekreto 44-a oni difinas :

1. Starigon de Kurso de Esperanto, kiu celos la praktikan scion de la helplingvo por korespondado kaj por la verkado de resumoj de la statistikaj publikigaĵoj.
2. La Kurso funkcios trifoje ĉiusemajne ; ĉiu leciono daŭros 50 minutojn ; oni prefere adoptos la metodon Ĉe.
3. Oni pagos la instruiston po 2 dolaroj por leciono.
4. La programo entenas du partojn : (a) Fundamenton, dum 18 lecionoj ; (b) Praktikon kaj

Perfektigon, dum 34 lecionoj. Oni liveros atestojn al aprobitaj gelernintoj.

En la dekreto 45-a oni difinas :

1. La lecionoj okazos marde, ĵaŭde kaj vendrede je la 12-a ĝis la 12-50-a (do dum la deĵortempo ; tio garantias grandan ĉeestadon).
2. Se iu tago destinita al la lecionoj estos festo, ferio aŭ simile, oni rajtos lecionojn en la tago antaŭa aŭ posta.

Varman gratulon al niaj brazilaj amikoj kaj koran deziron, ke la lernantoj estu tiel bonaj Esperantistoj kiel statistikistoj !

* * *

En Nov-Zelando nia movado kalkulas kelkajn kompetentajn kunlaborantojn, inter ili nian ĉefdelegiton Brendon Clark, praktikulo, poeto kaj lerta propagandisto samtempe. Inter la lastaj sukcesoj ni citu :

La Februara numero de *Better Business* (Pli bona komerco) enhavis favoran intervjuon kun S-ro Brendon Clark kaj traktis detale pri ties instruado kaj utiligo de Esperanto en la lernejo ĉe Makarau. (Bonvolu noti, ke la Ĉefdelegito nun loĝas en Leigh, N. Auckland).

La Aŭgusta numero de la grava instruista gazeto *National Education* enhavis tri artikolojn pri Esperanto ; redaktoran atentigon ; de la konata samideano S-ro Anton Vogt ; lertan traktadon pri la valoro de Esperanto kiel enkondukilo al lingvistado, de D-ro C. J. Adcock, Prezidanto de N.Z.E.A. kaj profesoro ĉe la Universitato en Wellington ; kaj elĉerpaĵon el letero de F-ino Joan Rogerson, kiu ĉeestis la Kongreson en Bern.

La 27-an de Aŭgusto S-ro Pastro Jasper Calder, tre konata prelegisto per radio, parolante en Stacio 1ZB Auckland, anoncis sin tutkora simpatianto al la Esperanto-movado. Li laŭtleĝis elĉerpaĵon el letero de la Ĉefdelegito de U.E.A. kaj sendube li instigis vastan atenton pri nia afero.

La 24-an de Septembro la Registara Perkoresponda Lernejo (por izolaj kaj kripligitaj infanoj) dissendis per nacia radio trian lecionon pri Esperanto por la disvasta Esperanto-klubo de tiu lernejo. S-ro A. Vogt klarigas la prononcadon de Esperanto.

Du novaj kluboj stariĝis en Te Awamatu kaj Leigh respektive kaj volas ricevi limigitan korespondadon.

(Vidu ankaŭ sub *Esperanto en la praktiko*).

La 31-a Bulgara Esperanto-Kongreso okazis en Aŭgusto en Jambol. Ĝi estis unu el la plej bone organizitaj kaj oni esperas, ke ĝi havos gravajn sekvojn por la bono de nia movado en tiu lando.

Reprezentanto de la ministro por popola klerigo, D-ro Dramaliev, ĉeestis kaj promesis apogi la postulojn de la Esperantistoj, ke Esperanto estu enkondukata en la lernejojn.

Oni inaŭguris vojaĝantan ekspozicion, kiu veturos propagandcele tra la lando.

* * *

En Hamburg 154 gepolicistoj sin anoncis por kurso de Esperanto en la polica lernejo tie.

La Kongreso de G.E.A. 1949 okazos en Göttingen.

* * *

Dum Septembro la Asocio de Laboristaj Esperantistoj en Nederlando organizis prelegvojaĝon de S-ro Mason Stuttard, helpredaktoro de *Esperanto*. La preleganto vizitis 12 urbojn en diversaj partoj de la lando kaj prelegis antaŭ la sekcioj—ofte en kunlaboro kun aliaj sekcioj tie—pri la temo *Postmilita Britujo*. La prelegoj vekis grandan intereson ĉe la gazetaro pro la fakta prezento de la situacio en tiu lando, kaj eĉ trovis eĥon en la Londona *Evening News*, kiu raportis pri la prelego en Rotterdam.

SAGACA PENTRISTO

La fama pentristo kaj karikaturisto William Hogarth (1697–1764) estis invitita de la riĉa sed avara Lordo Leslie ornamu la halon de nova kastelo per granda murpentraĵo. Kiel temon de la pentraĵo la respektinda lordo deziris la trapason de la Izraelidoj tra la Ruĝa Maro persekutitaj de la armeo faraona.

Hogarth postulis kiel honorarion cent gineojn; la lordo proponis dudek. Post longa sensukcesa marĉando la pentristo deklaris: „Bone, mi akceptas tiun sumon, sed nur kun la kondiĉo, ke vi pagu min tuj.

La lordo konsentis. Hogarth ricevis la monon. Li diris, ke li komencos la laboron la sekvantan matenon frue. Li venis je la fiksita horo, ne sola, sed akompanata de helpanto kun granda kaldrono enhavanta ruĝan farbon. Kiam la lorda moŝto malfrue venis el sia dormoĉambraro por vidi la progreson de la laboro, Hogarth informis lin, ke la pentraĵo estas jam preta.

“Kiel do?” demandis mirigite la lordo, ĉar li vidis nur muron tute brulruĝan. “Kion tio prezentas?”

“Tion, kion deziris via moŝto, la Ruĝan Maron,” respondis trankvilmiene Hogarth.

“Sed kie estas la faraono kun sia armeo?”

“Ili jam dronis” estis la respondo.

“Kaj la infanoj de Izraelo, kie ili estas?”

“Ili jam atingis la transan marbordon kaj estas sekuraj!”

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

Atingis nin informo pri valora decido de la Registara Turisma Departemento de


Novzelando

Novzelando eldonas 35mm. filmstrion kun Esperanta teksto, kaj ankaŭ belegajn fotografaĵojn kiuj taŭgas por reproduktado en landaj gazetoj, ne necese Esperantaj. La estonta intereso de la registaro tamen dependas de la rezulto de ĉi tiu eksperimento; tial samideanoj el ĉiuj landoj bonvolu skribi Esperantlingve petante la fotografaĵojn, kaj organizaĵoj, kiuj havas taŭgan aparaton, petu la filmstrion. Ĉio estas senpaga! Petu de: N.Z. Dept. of Tourist and Health Resorts, Wellington, Novzelando. Reciproke, presraportojn pri elmontroj de la fotografaĵoj, aŭ paroladoj kun la filmistoj, oni nepre sendu al la sama adreso. Estas tre grave, ke la registaro sciu la rezulton ĉar tiu rezulto eble venigos novan epokon por Esperanto en Novzelando.

Ni konsilas al niaj aktivuloj eluzi ĉi tiun okazon por montri, unue, en sia lando la praktikan valoron de nia lingvo, kaj due, al la citita departemento la utilon de la propagando per nia organizaĵo. Tamen *nepre skribu afere, letere*, por ne malkreditigi nian movadon per infanecaj skribaĵoj.

Helpo per Esperanto

Nederlanda misiisto vojaĝanta al Afriko malsaniĝis surŝipe, kaj estis necese transporti lin al Marista Hospitalo en Las Palmas. Soleca, sen konatoj, la misiisto skribis al la VD en Apeldoorn, Nederlando. Tiu, komprenante la situacion, sin turnis al la Delegito de U.E.A. en Las Palmas kaj petis lin viziti la malsanulon. Samideano Báez tion faris kaj la misiisto, dubema Saŭlo pri Esperanto, fariĝis entuziasma Paŭlo!



Jes, sinjoroj, preskaŭ ĉion ni ĝisdatigis.
Ni eĉ alvokas la fidulojn per Esperanto!

LA PETSKRIBO

Landoj			
Germanujo ..	5,726,296	Hungarujo ..	6,160
Ĉeĥoslovakujo ..	1,034,448	Urugvajo ..	4,704
Nederlando ..	1,022,118	Portugalujo ..	3,562
Norvegujo ..	490,382	Aŭstralio ..	3,370
Brazilo ..	212,856	Novzelando ..	2,540
Aŭstrujo ..	113,333	Svisujo ..	2,476
Francujo ..	95,809	Egiptujo ..	2,299
Svedujo ..	72,990	Grekujo ..	1,729
Belgujo ..	64,086	Maroko ..	1,330
Britujo ..	36,271	Palestino ..	531
Islando ..	28,348	Irlando ..	463
Bulgarujo ..	21,992	Kanado ..	402
Jugoslavujo ..	14,138	Sud-Afriko ..	295
Italujo ..	13,759	Hispanujo ..	276
Polujo ..	9,721	Hindujo ..	253
Danujo ..	9,111	Ceteraj lokoj ..	783
Usono ..	8,531		
Finnujo ..	6,390	sumo ..	9,018,000
Argentino ..	6,248		

Okupoj			
Artistoj ..	2,138	Navigaciistoj ..	1,145
Delegitoj Komunumaj	521	Parlamentanoj ..	258
Dentistoj ..	585	Policistoj ..	3,174
Desegnistoj ..	2,163	Presistoj ..	3,322
Dommastrinoj ..	45,964	P.T.T.-istoj ..	25,082
Edukaj Aŭtoritatuloj	1,171	Religiistoj ..	1,545
Elektristoj ..	3,100	Sciencistoj ..	1,214
Farmaciistoj ..	1,337	Sindikatĉefoj ..	504
Farmistoj ..	10,685	Soldatoj ..	3,403
Hotelistoj ..	1,798	Studentoj ..	34,155
Inĝenieroj ..	14,001	Ŝoforoj ..	2,383
Instruistoj ..	33,787	Ŝtatoficistoj ..	33,094
Juristoj ..	1,791	Teksistoj ..	9,843
Ĵurnalistoj ..	1,230	Transportistoj ..	493,055
Komercistoj ..	60,010	Urboficistoj ..	3,770
Konstruistoj ..	6,541	Vendistoj ..	9,303
Kuracistoj ..	4,533	Vestistoj ..	6,368
Laboristoj ..	57,913	Diversaj ..	8,112,037
Lingvistoj ..	1,538		
Metiistoj diversaj	23,539	sumo ..	9,018,000

Kolektivoj kolektitaj dum la pasinta monato

Nederlando—			
Voorzitter Partij v.d. Arbeid (Soc. Partio) ..			118,000
Eenheidsvakcentrale (Unueca Sindik. Laborista)			169,000
Vereniging v. Arbeiders Radio Amateurs			
(Radio Asocio V.A.R.A.)			130,000
Komunista Partio ..	..	..	55,000
Internationale Vereniging "Bellamy" ..			3,000
Britujo—			
Nelson & Dist. Weavers' Assoc. (Teksista Unio)			8,458
Belgujo—			
Vlaamse Toeristenbond (Turisma Ligo)			34,263
Brazilo—			
União dos Escoteiros (Skolta Ligo) ..			25,000
Liga Espírita do Brasil (Spiritista Ligo)			18,400
Germanujo—			
Socialdemokrata Partio—Buer-Horst ..			20,000
„ „ —Braunschweig ..			26,000
„ „ —Hannover ..			87,418
„ „ —Düsseldorf ..			56,868
Industriegewerkschaft Bau, Gelsenkirchen Buer			150,000
Industrie-Verband Bergbau, Abt. Verwaltung			120,000
Industrieverband Bergbau Gelsenkirchen—Buer			50,000

Gewerkschaft öffentl. Dienst, Ortsgr. Buer ..			6,000
Deutsche Angestellten-Gewerksch,			
Gelsenkirchen			3,000
Industrieverband Chemie, Papier, Keramik			
Gelsenkirchen			4,200
Komunista Partio, Gelsenkirchen-Buer ..			15,000
Christlich-Demokratische Union, Gelsenkirchen			6,000
Evangelische Gemeinde Buer ..	..	..	30,000
Katholische Arbeiter- u. Männerbewegung			
Gelsenkirchen			5,000
Komunista Partio, Kreis Gelsenkirchen, Abt.			
Werbung und Schulung			6,000
Kreishandwerkschaft Buer ..	..	..	1,500
Gewerkschaft der Eisenbahner (aldono al			
antaŭa subskribo)			140,000
Svedujo—			
Skaraborgs Distrikt av Arbetarnas, Skara ..			26,610
Kolektivoj el malpli ol mil : sume ..	..	..	1,965
			1,316,682

Sumo de kolektivoj ĝis 4.10.1948 .. 8,187,554

Ni deziras atentigi niajn kunlaborantojn pri la fakto, ke la kampanjo finiĝos en decembro. Tial, bonvolu tuj sendi al la Centra Oficejo ĉiujn restantajn foliojn por ke ni finfaru la registradon. Ankoraŭ restas tempo por kolekti kolektivajn subskribojn, kaj ni urĝe petas lastan klopodon en tiu rilato. Dankon al ĉiuj.

ESPERANTISTA VIVO

Niaj Mortintoj

Ni sciigis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

Bolsius, S-ro Max, Membro-Subtenanto de U.E.A. dum multaj jaroj, mortis en Antwerpen, Belgujo, la 23-an de Aŭgusto, 1948.

Clarke, Profesoro D-ro Edwin L., Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, mortis subite 15-an de Sept. en la vagonaro, en kiu li revenis de New York al Winter Park, Florida, kie li estis Profesoro de Sociologio en Rollins College. Li estis prezidinta kunvenon de la Administra Komitato de E.A.N.A. en New York 13-an de Sept. kaj tiam ŝajnis sufiĉa sana kaj forta. Li estis 61-jara. Lia morto estas granda bato por la Esperanto-movado.


Prof. Clarke fariĝis Esperantisto en 1908 kiam li hazarde trovis numeron de *Amerika Esperantisto* sur benko de stacidomo. Li gvidis Esperanto-kursojn en Clark College, Worcester, en la Universitato de Minesoto, (ankaŭ per radio) kaj fine en Rollins College, kie la lecionoj de Esperanto havas saman valoron por la fina atesto, kiel tiuj en aliaj lingvoj. De 1929 li estis Prezidanto de la Ekzamena Komitato de E.A.N.A. En 1946 la Kongreso en Conway elektis lin Vicprezidanto de la Asocio kaj iom poste li fariĝis Prezidanto. Lia reelektio en 1947 estis unuanima.

Prof. Clarke multe laboris por plibonigi kaj plikompletigi informojn pri Esperanto en usonaj enciklopedioj. Li faris ĉefan laboron pri la *Alvoko al Universitatoj kaj Kolegioj*, kiun E.A.N.A. publikigis en 1947. Li ankaŭ proponis kaj organizis la uzon de Esperanto por la *Alvoko al la Popoloj de la Mondo*, kiun Konferenco pri Mond-registaro en Rollins College alprenis en 1946. Li servis kiel U.E.A.-Delegito en diversaj urboj, laste en Winter Park, kie li loĝis de 1930.

Li verkis kelkajn librojn kaj multajn broŝurojn kaj gazetartikolojn.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe I.E.L.



*Diablot' en la Botel' :

R. L. Stevenson ; el Angla trad. Jozefo Seka. Eld. Esp.-Eldonejo Heinrich. Harasin, Mainz, Germanujo.

48p. broŝ. 1ŝ. 9p.

En la antaŭparolo de ĉi tiu unua numero de *Kajeroj Internaciaj* la tradukinto celas pravigi tion, ke li redonis verkon el lingvo, kiu ne estas lia gepatra. Malgraŭ ĉiuj bonaĵoj—kaj ili estas multaj—kaj malgraŭ kontrolo de la Lingva Sekcio de G.E.A., la rezulto emfazas la fakton, jam delonge rekonatan, ke la principo estas evitinda, kaj ke estas konsilinde lasi al samlingvanoj la privilegion redoni en Esperanto la verkon de naciliteratura majstro. Kaj homo, kiu kuraĝas traduki el la Angla—kiu inter okcidentaj lingvoj ĝuas la famon esti la plej subtila, la plej delikatanuanca kaj la plej sugestia—riskas akuzon pri troa aplombo.

Oni ne supozu el tio, ke la verko ne estas leginda. Tute kontraŭe ; la alloga kaj karakteriza rakontmaniero de R. L. S. penetras eĉ tra ĉi tiu nekutima drapaĵo, kiu vestas lian ĉarman, genie simplan historion pri la reciproke sin amanta paro, kiu implikiĝis en la maŝoj de cirkonstancoj, rezultantaj el intertraktoj kun la diablot, kiu loĝis en la mistera botelo.

Ĝenas dum legado la konstanta kaj nenecesita ke anstataŭ simpla ĉar ; formoj *kelkiel*, *kelkiam*, kaj kuriozaj evitindaj kunmetoj kun *nj* ekz. *kompatinginjo*, *etinjo*, *mianjo* p. 32. Multaj konstruoj estas nur laŭvortaj redonoj el la Angla kaj ili tute ne taŭgas : *mian domon*, la *elturantan* (p. 25) anst. *mian domon*, la *multeturan* ; *tia li estis kaj nenial miru* (p. 26) anst. . . . *kaj ne mirige estis* ; *Pretekstiĝis* (p. 33) anst. *Rondiris* ; *manĝis la pladojn puraj* (p. 39) anst. *ĉion elmanĝis lasante la telerojn puraj* ; *pli koleris ol ĝise* (p. 40) anst. . . . *ol antaŭe* ; *subsumo* (p. 43) *malpli granda sumo*. La elizioj en la titolo estas tute sen senco.

Povas esti, ke ĉi tiu verko trafos popularan akcepton en Germanujo, kie ekzistas manko de legmaterialo ; sed mi ne povas konsideri ĝin grava kontribuo al nia literaturo.

M.S.

Esperanto de August Weide ; eld. Freie Gewerkschaft G.m.b.H., Hamburg, Germanujo. DM 3.50.

Unu el la surprizoj de la postmilita Germanujo estas tiea vekigo de la Esperanta movado. Pro efika revastigo de la lingvo estas bezonataj libroj

kaj fervoraj instruistoj, precipe pro la fakto, ke la antaŭa registaro diktatore malhelpis la movadon.

Kun la subteno de la laborist-sindikato S-ro Weide provas helpi la movadon per ĉi tiu libro, kiu estas utila por la mem-instruanto, kiel ankaŭ por tiuj al kiuj mankas tiu memfido. Al tiuj lastaj la verkisto promesas helpon per korespondado ! La divido de la kurso en 24 lecionojn estas tia, ke post trastudo kun iom da diligento oni povas kompletigi la lingvokonon per konversacioj kaj korespondado. Al ĉiu leciono estas aldonita vortaro abocoe ordigita.

La libro bedaŭrinde enhavas multajn erarojn, mispresojn, kaj evidentas ioma nezorgemo kaj aliaj mankoj. Eĉ la abocoa ordo enhavas intermiksaĵojn. Preseraroj ĉe iuj vortoj povos erarigi komencantojn. Mi opinias, ke la aŭtoro ne sufiĉe emfazas la principon de vortkunmeto, kaj li krome uzas plurajn evitindajn Germanaĵojn *pridormi* p. 50, *akceptite* laŭ Germana senco p. 55 k.s. La ekzemploj por la legotekstoj tamen estas tre bone elektitaj kaj mi povas rekomendi la verkon kiel utilan instrumenton en la laboro de rekonstruo de la movado en Germanujo.

D-ro C. Sass

Nuntempa Pollando ; eldono de Asocio de Esperantistoj en Pollando, Varsovio, Marszałkowska 81/32. 60p. kartonita. Prezo nemontrita (verŝajne senpaga).

Progaganda kajero pri la rekonstruaj laboroj en Polujo post la milito, kun speciala emfazo sur la bonaj aspektoj de la nuna reĝimo. Traktas la politikan strukturon, ekonomion, klerigadon, eksterlandan politikon, domkonstruadon, profesiajn unuiĝon kaj la kooperativan movadon. Ĉio estas en formo de apartaj artikoloj. Oni invitas represadon en naciajn lingvojn.

Vivo kaj arto de Goya. Kompilis Agostinho da Silva (El la serio *Enkonduko en la kulturon*). 24p. 17.5×12.5 cm. Dek ilustraĵoj. El la portugala tradukis Vergilio Mendes. Portugala Eldona Rondo. Prezo 2 rpk.

Ĉi tiu libreto provas prezenti la pentriston Goya al internacia legantaro. Ĝi estas provo, sed estas dezirinde, ke iam aperu en nia verkaro io pli ampleksa, io pli elĉerpa, pri ĉi tiu eksterordinara artisto. Se Goya estus verkinta nur la gravuraĵojn *La teruraĵoj de la milito* li jam estus distingita figuro en la arto ; sed lia laboro ampleksis ĉion, la tutan ekstremismon en sentoj, pasioj kaj koloroj de Hispanujo.

Domage estas, ke la ilustraĵoj estas tre malbone reproduktitaj, ĉu pro la kliŝoj, ĉu pro la papero. La lingvo estas bona, kelkajn malglataĵojn oni ignoru.

H.J.

MONOLOGO DE LA PLUVO

de Miguel Zamacois

Mi estas la pluvo . . .

Mia funkcio, mia kaŭzo de ekzisto, kio mi estas, mia vivkondiĉo estas: fali. Se mi ne falus, mi estus nubo, nebulo, vapore, mi ne estus pluvo. Mi do povas diri: Mi falas, sekve mi estas!

La homoj ĝenerale ne amas min. Ili diras: *Enuiga kiel pluva tago*, kio tamen ne malhelpas ilin paroli pri *bonfara pluvo*. Ĉiuj iliaj juĝoj estas plenaj de kontraŭdiroj. Se dum unu semajno ili ne vidas min ili kriegas je mi. Falinte dum horo, mi jam sufiĉas al ili kaj ili malbenas min.

Ili deziras, ke mi falu dumnokte. Sed la pluvo ne estas same sensprita kiel la homoj. Por fali ĝi ne bezonas nenion vidi. Cetere, mi falas kiam al mi plaĉas.

La homoj ĉiel estas venkataj de la pluvo. Neniu neas, ke eĉ la plej fortaj inter ili venas sub la pluvo. Alia pruvo: la falo estas konsiderata de ĉiu kiel akcidento kaj plejofte homo, kiu falas, suferas. Por mi, kontraŭe, falo estas plezuro. Ju pli mi falas, des pli mi sentas min bonstata. Mi estas unu el tiuj maloftaj objektoj, kiujn oni ne povas haltigi. Mi konas nur la neĝon kaj la hajlon, kiuj rajte povas pretendi la samon pri si. Kaj ĉi tiuj du konkurantoj ne povas rivali kun mi je persisto kaj pacienco.

La diluvo . . . tio estas la plej belaj tagoj de mia vivo!

La pluvo ne estas tiom bruteca, kiom la homoj asertas. Ankaŭ ĝi konas la ĉarmojn de la revado kaj de la poezio; pli bone eĉ ol la plej delikatsentaj poetoj ĝi scias ŝvebi en la nuboj, pli bone ol ili ĝi scias sin levi super la aĉan vivon teran. Ne ekzistas nur la grandaj, la pezaj pluvoj; ekzistas la elegantaj, la delikataj, la penetrantaj pluvoj. Ekzistas ankaŭ la potencaj, akvofalsimilaj pluvoj, la torrentoj. Ĉiu scias, ke eĉ la plej robusta homo ne povas longe rezisti kontraŭ la plej eta pluvo kaj ke li devas malvenki en ĉi tiu malegala lukto.

La plej eta pluvo malsekigas en kelkaj momentoj giganton, kaj la plej timiga militisto, sur kiun falas pluvo, havas la solan deziron fuĝi kaj serĉi ŝirmon. La homo, kiu inventis la kirason kontraŭ glavobatoj kaj kontraŭ kugloj, devis eltrovi ankaŭ la pluvombreton, per kiu sin ŝirmi kontraŭ la pluvo. Kirason oni malofte trapikas, sed la pluvo trapenetras iam eĉ la plej solidan pluvombreton.

La plej malsaĝa pluvo mokas la homon. La plej spertaj meteorologoj ne estas kapablaj antaŭdiri tute certe la venon aŭ la daŭron de la pluvo. Se ne pluvos ili diras: "Tio estas sekvo de la sekeco . . . kaj pro tio ne falas pluvo."

Se pluvos, ili diras, ke la kaŭzo estas la diferenco en la aerdenso, la barometra premo, kaj ke tio daŭros tiom longe kiom ĝi daŭros.

La grandaj scienculoj estas cetere tre ĝentilaj al la pluvo kaj konstruas mezurilojn por akcepti la pluvon. Tial, ke ili ne povas malebligi la pluvon fali, ili mezuras ĝin. Kiam pluvos forte, eĉ la plej fama meteorologo povas iri hejmen, t.e. li povas sin deklari senpova. Oni rajte povas diri, ke la pluvo trompas la sciencon.

Mi havas miajn kapricojn kiel virino. Mia animo konas la animstaton de fulmotondro. Kvazaŭ vivanta estaĵo mi trankviliĝas, koleriĝas, fariĝas obstina, persistas, rezignas, interrompas min, preterpasas . . .

Mi povas esti kruela se mi volas. Jen mi frapas kontraŭ fenestrojn kaj skuas la vitrojn. Ifoje mi eĉ faras krimon, kiam mi subakvigas prisemitajn kampojn, subminas la murojn kaj superfluas la vojojn. Mi grandigas la riverojn kaj instigas la riveregojn je grandaj inundoj. Ifoje mi estas muzikema. Mi kantas ame sur la dense foliaro de l' arbaro. Mi estas ankaŭ pentristo. Neniu artisto iam trovis tiom brilajn kolorojn kiom tiujn per kiuj mi lumigas mian vizitkarton, la ĉielarkon.

Mi havas fortojn maloftajn. Eta pluvó sufiĉas por subigi fortegan venton. Mi estas unuaranga mastrumantino. Mi lavas la trotuarojn, purigas la stratojn, blankigas la tegmentojn. Mi estas higienisto de la nova skolo; mi purigas la atmosferon, la aeron kaj desinfektas la teron. Mi mortigas la mikrobojn kaj la ĝermojn de malsano.

Mi estas la providenco de la legomĝardeno kaj la feino de la kampoj. Mi estas la botanika hidroterapio. Mi estas la duŝo por la pizoj, la bano por la ŝalatoj kaj por la fragoj. Mi estas la amiko de la helikoj, de la anasoj kaj la ranoj, de la fiakristoj kaj de la taksiaŝoforoj, de la aŭtobuskompanioj. Mi estas la senkulpigo por la homoj, kiuj alvenas tro malfrue.

Mi estas la kaŭzo kaj la efiko. Mi estas la preteksto kaj la senkulpigo.

Tradukis Salas y Gomez

Simpatio

Kiel homo, kiu en tro varma tago
Kaŝe dormas apud trankvila lago,
Tiel, lacigite de la vivturmento,
Danke apud vi mi sidas en silento.

Vortoj, nura narkotilo por la menso,
Pli konfuzas al la konfuzita penso.
Al animo, lumo de l' animo venas:
Kion mi ne diras, tion vi komprenas.

*Originale verkis Brendon Clark,
Novzelando*

EN KELKAJ LINIOJ

Distingo de eŭropaj scienculoj : La Universitato de Chicago honoris James Leslie Brierly, britan korifeon pri la internacia juro, kaj la germanan fizikiston Max von Laue per la doktoreco honora. Brierly, profesoro en Oksfordo ricevis la distingon pro siaj difinoj de la leĝaj bazoj de tutmonda komuneco formulitaj en lia verdo *La estonteco de la interpopola juro*. Max von Laue, de la Universitato Göttingen, laboris pri la deklino de X-radioj en kristaloj.

Teatro : Temo de dramo ĝis nun ne realigita estis la vivo kaj morto de Maksimiliano de Aŭstrujo, Imperiestro de Meksikio. Sukcesa meksikia verkisto Rodolfo Ussigli verkis dramon kun titolo *Ombro-krono*, kiu prezentas la vivon de tiu habsburgano kaj lia edzino Charlotte (filino de Leopoldo I-a de Belgujo) laŭ vidpunkto de meksikiano. La unua prezento okazos en la Belga Nacia Teatro.

Kiel unuan prezentaĵon de la nova sezono, la Viena Akademia Teatro donos novan formon de *Anna Karenina* de Tolstoj, luditan kun evidenta sukceso pasintjare en la Moskva Artista Teatro. La titolrolon ludos Hilde Wagener.

Ingrid Bergman, la sveda aktorino, kiu prezentis tiom konvinke Jeanne d'Arc, la virgulinon de Orleans, estas nomita honora civitano de Domrémy, la naskiĝloko de Jeanne d'Arc.

Kiel unuan operon oni prezentis en Koreo *La Traviata* de Verdi sub direkto de enlandano, preparita en Italujo, kaj kiu tradukis la tekstlibron dum kelkmonata laboro. *La Traviata* oni prezentis dekfoje kaj ĝi trafis entuziasman akcepton.

Botanikaj ĝardenoj : La jugoslava ministerio por agrikulturo decidis la kreon de scienca instituto por akceli kulturadon de eksterlandaj plantaĵoj ĉe la bordoj de la Adria Maro. La instituto serĉas kunlaboron kun similaj institutoj en aliaj landoj.

Shaw kaj la vegetarismo : Usonaj vegetaranoj riproĉis al G. B. Shaw, ke li permesis injektojn de hepato, ĉar tio necesigis mortigi vivantajn estaĵojn. Shaw respondis per la konata poŝtkarto : "Estante 92-jara mi provis kuraci anemion per hepatinjektoj. La uzo de glandekstrakto dum vegetara dieto estas same rajtigita kiel la konsumo de lakto kaj fromaĝo. Rezigni entute la mortigon estas neeble. Kaj se vi nenion scias pri akridoj kaj blankaj formikoj, tamen certe la terpom-skarabo ne estas de vi malkonata."

Puŝkin-honorigo : La sovetia registaro decidis krei specialan komitaton por prepari dignan honorigon de la poeto Puŝkin, okaze de la 150-a datreveno de lia naskiĝo (9-an de Junio 1799). La komitato konsistas el 46 verkistoj. Antaŭvidata estas la kreo de Puŝkin-muzeo en Moskvo.

Katedro por bonhumoro : El la lando de senlimaj ebloj venis informo, kiun en ordinara tempo oni konsiderus ŝerco. La Universitato de Kalifornio en Berkeley decidis starigi katedron de literaturo sub la nomo *Mark Twain*. Tiu katedro servu speciale por flegi bonhumorajn verkojn de la tutmonda literaturo. La Societo Mark Twain kaj admirantoj de tiu specife usona bonhumoristo jam kunigis sumon de 300.000 dolaroj kiel fondaĵon. Eble realiĝos iam la tiom necesa *Doctor humoris causa* !

Motociklo—latinlingve : La papo sin turnis per *breve* (letero) al la motociklistoj. En tiu dokumento la motociklo havas la nomon : *Birota ignifera latice incita*. Tio signifas : biciklo, movata per likvida brulmaterialo ! Plia pruvo, ke la latina lingvo ne povus servi kiel help-lingvo popola !

Faka legado : En parlerneja serio de libroj *Faka Legado* aperanta en Danlando, instruisto Hans Dalgaard, St. Heddinge, publikigis verketon *Zamenhof, kreinto de Esperanto*. Per konvinka maniero kaj akompano de multaj ilustraĵoj, la verkinto (samideano) prezentas la vivon de nia majstro. La libreto finiĝas per prova leciono.

Redono de artkolektoj : La Usono Milita Registaro en Germanujo starigis centron por la kolektado de artobjektoj kunigitaj de la Nazi-registaranoj. Ĝis nun estas kolektitaj pli ol 14000 pentraĵoj, skulptaĵoj kaj murtapiŝoj (gobelinoj), kiujn oni transdonis al la Bavara Kultur-Ministerio. Per tio la bavara ŝtato ricevis la objektojn, kiuj apartenis al ĝi, kaj rilate la ceterajn ĝi akceptis la taskon prizorgi ilin. Ne malpli ol 4000 pentraĵoj, inter ili verkoj de Rembrandt, Rubens, Tintoretto, Ticiano, venis el la kolekto de Hitler, kiun li destinis por la *plej granda muzeo en la mondo* kreota en Linz. La tuta kolekto estis trovata en salminejo proksime de Salzburg. Pliaj artaĵoj venis el la kolekto de Göring kaj el la deponejo de la stabo de Rosenberg.

SYNNØVE SOLBAKKEN

Bjørnstjerne Bjørnson

Plaĉa Norvega rakonto tradukita de
Edith kaj Aŭgust Weide

2ŝ. 3p. aŭ 9 rpk, afrankite

Mendu ĉe U.E.A.

PACO

Karlo Aszlányi

1

La prauloj de Tensen MacPhab legis la Biblion, maĉis tabakon kaj ĝenerale mortigis siajn malamikojn. Tenson iome ĝene sidadis ĉe la muro de la "King's Garden"* kaj rigardadis la vesperajn nubojn, kiuj pasis tiel malrapide, kvazaŭ montrilo de horloĝo.

Sur la folioj de la plantaĵoj videblis ore-ruĝaj roseroj. La barbo de maljuna gardisto estis tute samkolora, kaj sur la najlan finon de sia bastono tiamaniere li pikis aron da falintaj ruĝaj folioj, kvazaŭ li portus antaŭ si la duplikaton de sia propra barbo.

Tenson MacPhab sentis la pacon; li sentis la Pacon, kvazaŭ ian ŝaŭman sambuk-odoran realaĵon, en kiu oni povas sin bani. En lia sango estis la malnova piratfilozofio, la *praktika saĝo*, kiun la Tempo lernis el la vivo de maristoj kaj surteraj rabistoj. Jen ĝi: kiam oni sentas la Pacon sur la manartikoj kaj nuko, tiam ĝi jam finiĝas, kaj kiam la paco fariĝas Paco, tiam ĝi jam tute ne ekzistas.

MacPhab sciis, ke io ne estas en ordo. La aferojn li kutimis rigardi el du direktoj kaj ĝenerale ankaŭ el la direkto de la kontraŭulo... Li ne kulpigis la riĉulojn pro tio, ĉar ili estas riĉaj, kaj la kulpulojn pro tio, ke ili estas kulpaj. Sed nun, dum li sidis ĉi tie, kvazaŭ sur bildkarto, nun klare kaj kompreneble ekparolis en li voĉo, eble voĉo de iu malnova MacPhab:

"Sufiĉis, infano, ĉi tiu sintrompo. Ĉio estas malbona; ĉiu estas kulpa; en la inferon kun la tuta societo; batu ilian kapon."

Tenson time trankviligis la maljunan kelton,† kiu eble havis grandan, ruĝan kapon kaj kredeble ĉiutage li batis la kapon de iu. Sed Tenson timis, ke la policisto povas aŭdi, kion interne parolas ĉi tiu batalema praulo.

Pro tio li tuj plu iris, en tiu vana espero, ke oni povas forlasi sur benko ĉiun sian malagrablaĵon. Merloj saltadis ĉe liaj piedoj kaj zumantaj skaraboj rondiris sub la araneaĵoj foliaraj.

Tenson, por interkonsenti kun la incita voĉo, mem ekĝemis jene:

"Nun jam certe io okazos, jes, ĉar tiel ne povas daŭri plu."

La knabinetoj kun grandaj, timaj okuloj rigardis al Tenson kaj ankaŭ policisto suspekto rigardis lin. Tiom estas videble, se oni sentas, ke io devas okazi.

* trinkejo.

† kelto (angle: celt); la praaĵ loĝantoj de Skotlando.

Kaj tiel okazis. Sed antaŭe pasis monatoj kaj ankoraŭ ĉiam okazis nenio.

2

Tamen Tenson ne estis mola homo. Okazis nenio, la ĝenerala havaĵo plimultiĝis, la 'havaĵo' de Tenson pli malmultiĝis.

Oni havas monon, aŭ ne.

Se oni havas ĝin, tiam oni diras nenion. Se oni ne havas ĝin, tiam oni devas akiri ĝin, jen la vero.

Akiri estas eble multmaniere. En tegitaj kontoroj, en fabrikoj, en la borso sidas sinjoroj kun smokingoj* kaj akiras la monon. En la vendejoj bonhavaj negocistoj; en Pimlico kaj malsupre, en la ombro de la riverbordaj magazenoj ĝentilhomoj kun ĉapo kaj ŝalo praktikas la manieron de la monakiro. Propre ĉiu homo nur tiumaniere povas akiri monon, se li forprenas el la mono de alia. Jen la fakto. Pri tio eĉ la ŝtato ne estas escepto. Privata homo monon same ne povas fabrikii senpune, kiel la ŝtato. La mono efektive estas tia vivanta estaĵo, kiu povas danki sian vivon al la homoj kaj pro dankemo ĝi manĝas ilin. La mono vivas kiel la bakterioj kaj ĉar en amaso ĝi vekas agrablan senton, ĝi estas la kaŭzo de la plej danĝera malsano en la mondo.

Tiuj estas ĝeneralaj veroj, kiujn ni trovas eĉ ne en unu el la romanoj de Ohnet, ĉar ankaŭ tiam estis superflue skribi pri ili. Sed Tenson estis malnovmoda homo kaj dum kreskis lia mizero, lia vivkoncepto ĉiam pli kaj pli proksimiĝis al la malorda mondrigardo de lia praulo vivanta kaj koleriĝanta en lia brusto. Tenson en sia eluzita flanela pantalono tiel iradis sur la stratoj, kvazaŭ pirato, de kiu oni forprenis liajn torĉon kaj longtuban pafilon al li lasante nur malkaran, malbonodoran cigaredon, krom la muskoloj, kiujn la publika ordo ne permesas uzi.

Post ĉi tiuj parafrazoj ni fiksu la faktojn.

Tenson MacPhab finis la mondmiliton kun bonegaj rezultoj. Sed ĉar la diplomo ne signifas laboron, tiel ankaŭ la supra plenumo kvalifikis lin al nenio. Li estis homo kun larĝaj ŝultroj, malhelgrizaj okuloj kaj kun multe da amaro en la voĉo. La vivo estis al li tre maljusta, sed plej maljusta hodiaŭ.

Jam antaŭ jaro li perdis sian lastan oficon kaj ĉi tiu jaro sufiĉis, por ke li liberiĝu de ĉiuj siaj restintaj valoraĵoj kaj elĉerpu sian ŝparitan monon. En ĉi tiu tago ankaŭ tiu danĝero minacis lin, ke li perdos sian loĝejon, pro sep pundoj†

* senbaska frako

† pundo: angla monunuo valoranta proksimume 20 sv. fr.

da ŝuldo. Kaj kiam li anoncis sin ĉe la ĉefinĝeniero-direktoro de la ŝtalfabriko Terbanks, ĉi tiu amerikdevena sinjoro diris al li la jenon :

“La scienco kaj tekniko, mia juna amiko, jam montras la saman troprodukton, kiel kelkaj branĉoj de la arto. Do jam ankaŭ ĉe ni ne sufiĉas, se iu estas unuaranga inĝeniero, aŭ talenta inventisto, kiel ekzemple, vi : ankaŭ tio estas bezonata, ke oni konu lian nomon, ke li mem povu entrepreni ĉion, ke li havu reklamon kaj famon.”

“Sed mi,” diris Tenson, embarase starante sur siaj grandaj piedoj, “kaj tial mi lernis, ke . . . ”

La ĉefinĝeniero mangestis rifuze. Li ne tial estis ĉi tie, ke li aŭskultu la teoriojn de laborserĉantoj. Sed la okuloj de Tenson danĝere mallumiĝis : neniam li povis ellerni trankvilan akcepton de rifuzo. Ke oni rifuzu lin, kiu en la milito ricevis tiom da ordenoj kaj . . .

“Nu, bone !” li diris tute ruĝa pro kolero, “mi iros rekte al sinjoro Terbanks !”

Li ĵetfermis la pordon kaj jam ne vidis, ke la ĉefinĝeniero postrigardas lin kun indulga kompato.

3

Ne, Tenny ne sciis, kion li diris. Ne estis simpla afero “iri al sinjoro Terbanks”. Astor Terbanks estas la ŝtalreĝo de la Imperio, kies militmovoj kelkfoje ekskuis ankaŭ la borson en New York. Astor Terbanks estas la sinjoro de la duono de Kensington, li estas potenca, riĉa kaj forta. Li jam plurfoje rifuzis la inviton al nobeliĝo, dirante ke li ne bezonas nobelecon, rangon kaj similajn bagatelojn. Li estas kontenta, ke li havas la duonon de la tutmonda ŝtalmerkato kaj tiom da karbminejoj sur la britaj insuloj : kaj ili estas en liaj manoj. Terbanks havis dek kvar sekretariojn, kiuj forigis la homojn el lia privata vivo, kaj sep direktorojn, kiuj laŭ lia semajna ordono aranĝis liajn negocajn aferojn. La programon de unu semajno oni antaŭe fiksas, kaj ne estis tertremo, kataklismo, kio estus povinta tion ŝanĝi.

La sola parenco de Terbanks estis nevo, kiun li dungis en la fabriko—kaj nur pro tio, ke li liberiĝu de li. Tiu ĉi nevo havis la taskon rifuzi tiujn, kiuj petis helpon. Pro la konstanta plimalboniĝo de la ekonomio ĉi tiu ofico fariĝis ĉiam pli kaj pli malfacila. Ankaŭ Tenson MacPhab trafis al ĉi tiu junulo kaj ĉi tie komenciĝis lia feliĉo, aŭ malfeliĉo, tutegale kiel ni nomas tion. Propre evidentiĝis, ke ĉi tiu junulo estis tiu kaporalo, kies vivon Tenny savis ĉe Ypres. Tiamaniere poste okazis la neebleco : Tenson MacPhab povis eniri la antaŭcambron de la Prezidanto.

La ĉefsekretario—pro la peto de la nevo—estis ema anonci Tenson al la Prezidanto. La

Prezidanto murmuris ion, kion oni povis konsideri tiel ‘jes’, kiel ‘ne’, kaj la ĉefsekretario ŝultroleve venis el lia ĉambro :

“Eniru,” li diris, kun necerteco.

Kaj Tenson eniris. Kial li ja ne eniru ? Li troviĝis en laborĉambro tegita per kverka ligno kaj li vidis la ununuran kirasskribtablon de la mondo. Malantaŭ ĝi sidis Astor Terbanks.

4

“Mi havas la honoron.” diris Tenson. La ŝtalreĝo tranĉe kaj senkompate alrigardis lin.

“Mi havas la honoron,” li respondis, “sed al kiu mi havas la honoron, he ?”

“Mi estas MacPhab, sinjoro. Pro tio mi venis al vi, ke mi petu vin pri ofico aŭ helpo. Mi scias, ke malmultaj sukcesis ĝis nun persone peti vin . . . kaj tiel mi sentas . . . ”

“Nu, mi atentigas vin”, diris la ŝtalreĝo, “ke en miaj dungitoj estas multe pli da socia sento, ol en mi. Atendu nenion.”

Tenson sentis fortan trompiĝon. Sed li daŭrigis.

“En la milito mi savis la vivon de via nevo kaj . . . ”

“Des malpli. Tiu ĉi nobla gesto de tiam kostas al mi po kvardek pundojn monate.”

“Sed sinjoro . . . ”

“Por vi ni ne havas laboron. Se estos laboro, tiam prezentu vin en unu el miaj fabrikoj.”

“Sed sinjoro, mi nun bezonas helpon. De unu jaro mi estas senlabora kaj nun tiu danĝero minacas min, ke pro sep aĉaj pundoj oni elloĝigos min.”

Astor Terbanks ekscitiĝis.

“Sep ? ! Aĉaj ? ! Ĉu vi havas imagon pri tio, kiom alta sumo estas sep pundoj ? ! Se mi elĵetus tra la fenestro po sep pundoj . . . ”

“Mi,” balbutis Tenson, “vere . . . ”

“Tio estas la hodiaŭa generacio,” meditis la Prezidanto, “por ili sep estas bagatelo. Vi estas forta, juna, sed anstataŭ labori, vi venas ĉi tien kaj volas al mi diri, ke sep pundoj estas bagatelo. De kie mi prenu por vi sep pundojn ? ! Ĉu morgaŭ vi denove venus ? ! Tio estas ducent dek pundoj monate ; jare pli ol dumil tricent, amiketo !”

Tenson perdis sian trankvilon super siaj torturitaj nervoj. Lia vizaĝo danĝere ruĝiĝis.

“Mi ne diris, ke . . . ”

“He,” interrompis lin la prezidanto, “por persono kiel vi sep estas bagatelo. Jen rigardu, ĝuste sep minutojn vi rabis el mia tempo. Sep minutojn ! Kvankam pro higienaj kaŭzoj estas grave por mi la posttagmeza dormo ! Vi rabis sep minutojn el mia dormo ! Sufiĉe ! La vivo jam

instruos vin, junulo, kiel granda numero estas la sep! Foriru!”

Tenson MacPhab foriris. Sensalute li kuris tra la antaŭĉambroj kaj kontoroj, koridoroj kaj ŝtuparoj, ĝis fine li atingis la straton kaj forte spiris en la libera aero. Liaj nazloboj vastiĝis, antaŭ liaj okuloj ĉio malklariĝis. Tiu ĉi insulto, kiun li nun spertis, vekis en li liajn plej malnovajn praulojn, kiuj jam en la tempo de Makbeto estis rajdrabistoj kaj ribelis kontraŭ Lordoj Glamis kaj Cawdor. Li sciis, ke nun li ne povas kuri hejmen kaj preni sian ĉevalon, kaj ankaŭ glavon li ne povas aliksi al la talio, sed proksimume, li sciis, kion li devas fari. Tia amareco superregis lin, ke la mondo dancis ĉirkaŭ li, liaj muskoloj streĉiĝis kaj liaj okuloj vibris pro kolero.

(Poste li iom trankviliĝis, sed nur ekstere. Por la malbonŝanca Astor Terbanks, Tenson ne estis tia homo, kies kolero foriĝas. En li ŝtoniĝis la sento de la kolero kaj indigno, por ke ili neniam malaperu).

Li eniris la plej proksiman poŝtoŝtation kaj skribis iun tekston, kiun poste li sendis al adreso de anoncoŝtation. Poste li iris hejmen, kunprenis siajn paperojn—ĉiun alian havaĵon li lasis tie, pro la sep pundoj. Nun li tranĉis malantaŭ si la lastan ponton. Li iris al la Oficejo de Militintoj

kaj tie prenis en unu sumo sian dumvivan pension—proksimume kvincent pundojn—kaj luis ĉambron inkognite en unu el la sudaj flankstratoj de Grosvenor Square.

5

La postan matenon sur la unuaj paĝoj de *Daily Mail*, *Age*, *Globe*, *Morning Post*, *First London Herald* kaj tri malpli grandaj ĵurnaloj aperis la sekvanta diklitera informo, farante grandegan sensacion.

“Mi, la subskribinta senlabora inĝeniero, deklaras ĉi-loke, ke sinjoron Astor Terbanks, la Ĝeneral-prezidanton de la Unuiĝintaj Britaj Ŝtalfabrikoj, la listogvidanton de la anglaj impostpagantoj, la posedanton de la B.R.Th. Steel Co., la financan eksperton de la ĉiamaj registaroj, la dunginton de kvardeksepmil laboristoj, dum unu semajno komenco de morgaŭ mi vangofrapos unufojon ĉiutage antaŭ atestantoj. En tio povos min malhelpi nek ĉiela, nek tera potenco. Mia celo estas, ke sinjoro Astor Terbanks bone lernu kaj laŭvalore taksu la gravecon de la numero sep.

William Tenson MacPhab.”

Pri la sekvo de ĉi tiu okazintaĵo oni legu en la libro “Sep Vangofrapoj”. La ĉi-supra teksto estas represata kun afabla permeso de The Esperanto Publishing Company.



Aerfoto de Bournemouth

LA KATO EN LA SAKO

Dum longa tempo regis en la kajuto tomba silento. Tabakfumo ŝvebis ĉie. Tri junuloj sidis aŭ kuŝis laŭ diversaj pozicioj kaj en diversaj statoj de profunda meditado. Ili estis en negliĝo.

Unu el ili sidis sur seĝo kvazaŭ sur ĉevalo, kun siaj kruroj ambaŭflanke de la sidplato kaj apogis sin sur la apogilo, kiu troviĝis antaŭ li anstataŭ ĉedorse. Li estis maldika, tamen grandosta, kaj kredeble altstatura ĉar li havis tre longajn krurojn. Lia vizaĝo estis lentughava kaj super ĝi abundis fajre ruĝaj haroj. Lia rigardo estis direktita al punkto sur la plafono dum li ringe kirligis supren la tabakfumon.

Ĉe la kontraŭa muro sin trovis tri kuŝejoj unu super la alia, fiksitaj al la muro kaj sur la meza sin sternis alia junulo. Li kuŝis kun la fingroj interligitaj ĉe la nuko tiel, ke la manoj formis oportunan kavon por la kapo. Ankaŭ li fumis. Li tenis cigaredon inter la lipoj kaj nerve ĝin rulis de unu buŝangulo al la alia, intertempe elblovante la fumon tra la naztruo. Li havis brunajn bukajn harojn kaj malgrasan vizaĝon, kiu bruniĝis de suno kaj vento. Lia jako pendis sur hoko apud la kuŝejo, kaj la muskoloj de la nudaj brakoj elstaris, montrante la latentan forton, kiu tie sidis.

La tria junulo sidis sur seĝo. Tamen liaj piedoj estis sur la malgranda tablo. La seĝo estis malantaŭen ŝovita tiel, ke ĝi staris sur la du malantaŭaj piedoj, kaj la junulo sin svingis tien kaj reen per simpla fleksado kaj malfleksado de la genuoj. Ŝajnis iafoje, ke li tute renversiĝos; tamen per bela kalkulo de distanco li ĉiufoje sukcesis teni sian ekvilibron. Li havis plaĉan vizaĝon, rondan, ruĝetan, kaj blujajn okulojn. Liaj blondaj haroj estis zorge brositaj. Tamen li kolere sulkigis la frunton dum li rigardis la pinton de sia dekstra ŝuo.

Estis evidente, ke ili luktis kun granda kaj grava problemo. Sur la planko en unu angulo de la kajuto troviĝis vojaĝsako. Ĝi estis malfermita kaj en ĝi estis videblaj diversaj objektoj—boteloj da konjako, viskio kaj rumo kaj skatoloj da cigaroj.

La cigaredo de tiu junulo sur la kuŝejo forbrulis ĝis la lipoj kaj per rapida movo li ĝin ekprenis kaj forĵetis tra malgranda rondforma fenestro. Li blasfemis.

“Devas esti ia rimedo por elirigi ĝin!” li diris. “Ĉu vi ne povas ion elpensi? Kion pri vi, Dave? Vi kutime trovas solvon de niaj problemoj!” li alparolis tiun, kiu akrobatis per la seĝo.

Tiu respondis, “Ne, Jock. Estas diable malsimple. Mi tute ne povas elpensi ion. Kaj tamen ni devos ion fari. Restas nur kelke da horoj . . . Kion pri vi, Bob?”

La tria malrapide skuis la kapon je neo, kaj poste diris, “Ne, mi estas venkita. Kiam ni aĉetis tiujn objektojn, mi kredis, ke estos simpla afero ilin kontrabandi. Tamen post miaj esploroj hodiaŭaj, mi tute ne scias, kiel ni povos superruzi la gardiston. La sola elirejo estas tiu pordego, kie la polistoj deĵoras kaj ili priserĉas ĉiun eliranton. Se ni provos transgrimpi muron, ni certe vidiĝos ĉar armitaj policistoj privagas la tutan dokejon. Do, kiel . . .”

En tiu momento okazis interrompo. Sekve de la moviĝo kaj parolado, la kato, kiu dormetis sur tapiŝeto, vekigis. Ĝi sin malvolvis, sin streĉis kaj per granda buŝo oscedis. Subite per granda salto ĝi sin ĵetis kaj aliĝis al la brusto de Dave, kiu tiumomente ĵus atingis la limon de sia malantaŭensvingo. Liaj kruroj estis rektaj kaj li apenaŭ konservis sian ekvilibron. Tial la kroma pezo de la kato sur lia brusto sufiĉis por renversi lin kaj kun granda bruo li alplankiĝis.

Kun la sono de ridegado en la oreloj, li ekstaris kaj restarigis la seĝon. En la momento de falo, la kato per alia salto atingis la supran kuŝejon, kie ĝi pese rigardis aferojn kaj sin pretigis por eviti ian punon. Dave laŭte kaj libere blasfemis kontraŭ ĝi, sed neniel provis ĝin ataki, kaj fine stimulate de la ridado de siaj kamaradoj, ankaŭ li ekridis.

Subite Jock ĉesis ridi. Li pensis momenton kaj jen ekkriis, “La kato! La kato! Jen mi ĝin havas!”

La kamaradoj mire rigardis lin. Dave diris, “Kion vi havas . . . ? Kiun katon?” Kaj Bob diris, “Ĉu vi frenezaĉas?”

Jock deiris de la kuŝejo. Mallaŭtiginte la voĉon li diris, “Ne, ne . . . aŭskultu . . . Mi elpensis solvon de la problemo . . . tiu . . .” kaj per dikfingro li indikis la sakon kaj ĝian enhavon.

Ĉe tio, la tri kapoj kuniĝis kaj dum kelka tempo aŭdiĝis nur flustrado kaj ridoj . . .

* * *

Du horojn poste la tri junuloj, nete vestitaj, kun ŝuoj spegulece brilaj kaj kun ĉapeloj malantaŭen ŝovitaj sur la kapoj, marŝis de la ŝipo al la elirejo de la dokejo.

Jock, meze de la trio, portis mezgrandan vojaĝsakon krom la kutima, malgranda sako,

kiun portis ĉiu el la tri. Tute maltime, eĉ spite, ili alproksimiĝis la pordegon, kie deĵoris altstatura, dikventra policisto kun ruĝa vizaĝo.

Ili ekpretermarŝis lin kun saluto, "Bonan tagon!" kiam per tondrosimila voĉo li kriegis, "Ho, vi! Haltu!"

La trio, kvazaŭ ŝanceliĝe, haltis kaj ŝajnmire rigardis unu la alian. "Ĉu li aludas pri ni?" diris Dave al la aliaj du, sufiĉe laŭte por ke la policisto aŭdu.

Kun minaca mieno tiu grandpaŝe marŝis antaŭen kaj haltante antaŭ ili, kun la piedoj larĝe apartaj, metis la dikfingrojn sub la zonon. Tiel barante al ili la vojon, li denove kriegis, "Jes, vi!"

Bob ŝajnigis naivecon kaj al la kamaradoj diris, "Jes, li efektive aludas pri ni. Mi demandas al mi, kion li deziras?"

La aliaj levis la ŝultrojn. "Kion li povas deziri?" demandis Dave.

La policisto ekkolere kunpremis la lipojn. Li maĉis tabakon kaj antaŭ ol paroli li perlange metis ĝin de unu flanko de la buŝo al la alia. Tiam li elkraĉis. Tion farinte, li tondris, "Kion vi havas en tiu sako?"

Denove la trio mire rigardis unu la alian, ripetante, "Sako...? Sako...? Sako...?"

Kolere la policisto blekis, "Jes, sako! S-A-K-O, sako!" sarkasme, "ne dorsosako, mansako, papersako, tornistrosako, monsako, nek nazsako,* sed simple 'sako'. Mallonge, tiu sako, kiun vi, junulaĉo, portas ĉe la mano!"

Jam aliĝis al la areto kelke da doklaboristoj, kiuj ridis je la parolo de la policisto. Tio metis lin en pli bonan humoron.

Jock per komprenema rideto diris, "Ho, vi volas diri 'sako'!" Sin turnante al la kamaradoj, li klarigis, "Li aludas pri ĉi tiu mia sako!"

Bob kaj Dave responde ridetis, "Ho, ĉi tiu sako!"

La policisto malpacientiĝis. Li kriegis, "Nu, vi, mi ne volas malŝpari tempon je vi. Kio estas en tiu sako? Mi vin avertas, ke vi ne eliros el ĉi tiu dokejo, ĝis kiam vi faros deklaron!"

Jock malatentis la viron kaj alparolis siajn amikojn, "Mi opinias, ke ĉi tiu sinjoro ne amas nin. Mi kredas, ke pli bone estos diri al li, kio estas en la sako. Tamen, mi volus, ke li ne kriegu je ni. Nu, sinjoro policisto, rilate la enhavon de mia sako... se vi efektive deziras scii... Ĉu vi deziras scii...? Nu, nu, sinjoro, mi petas, ne tiel blasfemu. Miaj kamaradoj ne kutimiĝis

je tia lingvaĵo... Do, se vi devas scii, nu... e... estas la kato...!"

La viro estis tiel kolera, ke li preskaŭ apopleksiis. Lia vizaĝo fariĝis eĉ pli ruĝa dum la ĉirkaŭstarantoj ekridis.

"Kato!" li fine eksplode eldiris. "Kato! Kiu kato?" li ripetis. "Per Jesuo Kristo! Mi instruos al vi! Ĉu vi atendas, ke mi kredu tion? Kato! Malfermu tiun——sakon! Malfermu ĝin!"

La tri kamaradoj reciproke rigardis sin en konsterno. Post paŭzo, dum kiu ili malhavis sian petoleman manieron, Davis diris, "Sed, sinjoro policisto, estas neeble! Se ni malfermos la sakon, la kato elsaltos kaj forkuros..."

"Jes, sinjoro policisto," eĥis Bob, "kaj ni ja kun malfacileco ĝin ensakigis! Vi povas havi nenian ideon, kiel diable malfacile estas ensakigi virkaton..."

La policisto fariĝis eĉ pli minaca. Li saĝnis plidikiĝi kaj plialtiĝi antaŭ iliaj okuloj. "Silentu!" li tondris. "Malfermu tiun sakon! Vi jam sufiĉe petolis. Mi donas la ordonojn ĉi tie!"

Jock aldonis sian kontribuon. Per sincera kaj plenda voĉo li diris, "Sinjoro, mi petas, mi petegas vin. Ne devigu al mi malfermi mian sakon. Mi ĵuras al vi, ke estas vere, kion mi diras. Estas la ŝipa virkato. Ni portas lin al la bestkuracisto. Vi komprenas, ĉu ne? Kaj morgaŭ la ŝipa kuiristo lin reportos. Ni devis ĉasi lin dum tuta horo antaŭ ol lin kapti kaj meti en la sakon. Sinjoro, indulgu nin, mi petas. Se nia petolado vin ofendis, mi humile petas vian pardonon."

La humoro de la policisto ŝanĝiĝis. Li komencis ĝui la aferon. Ĉi tio estis pli laŭ lia gusto. Jen, oni humile petas lin. Bone. Li instruos al ili, kiu estas la mastro. Li ekridetis, kun iom da malico. "Neniom valoras via petado, junulaĉo. Mi jam multfoje aŭskultis tiajn rakontojn. Ĉu vi kredas, ke mi estas naivulo?" Li sin turnis al la ĉeestantoj. "Ĉu vi iam aŭdis similan? Kato en la sako! Ha! Ha! Ha!" Kaj la amaso simpatie ridis.

"Nu, rapidu, junulo. Ne utilas prokrasti. Kion vi havas tie? Ĉu viskion? Ĉu cigarojn?"

Jock en granda embaraso faris lastan peton. "Sinjoro, por la lasta fojo, je mia honoro mi ĵuras, ke en la sako sin trovas nenio alia, krom la kato!"

Nur unu vorton elkraĉis la policisto. "Malfermu!"

Kun rezigna ŝultrolevo Jock surterigis la sakon. Ĝin malŝlosinte, li malrapide levis la kovrilon. Ĉiuj antaŭen sin klinis por rigardi. Sur la vizaĝo de la policisto sidis kontentaĉa rideto.

* aludo pri la sako, kiun oni alligas al la kapo de ĉevalo por ĝin manĝigi.

Subite el la sako saltis granda nigra kato, kiu tuj kuregis kiel la vento returne al la ŝipo. Ekkrioj de miro venis de la rigardantoj, kaj ĉiuj kapoj sin turnis al la direkto de la ŝipo.

La aspekto de la policisto estis tia, kvazaŭ li vidis fantomon. Li estis ŝtonigita de surprizego. Li aspektis, kvazaŭ li ne povus kredi la propran vidpovon. La okulgloboj elstaris, kvazaŭ ili elsaltus el la kavoj kaj li buŝo malforte gapis.

Jock atakeme lin alparolis. "Nu, ĉu vi estas kontenta? Jen, kion mi diris! Ĝi forfuĝis. La ŝipestro aparte ordonis al ni, ke ni kunportu la katon al la bestkuracisto. Nun ni devos reiri kaj ĝin rekapti. Nia vagonaro foriros post kvardek minutoj."

Ankaŭ Bob profitis la embarason de la viro. "Jen bela maniero trakti tiujn, kiuj servas la patroŝandon. Ni estas for de la hejmo tri monatojn sur fremdaj maroj kaj ni ricevis tritagan ferion. Se mi maltrafos mian vagonaron mi devos atendi ĝis morgaŭ. Do unu tago jam for!"

La kunsento de la rigardantoj estis gajnita. Sed antaŭ ol ili povis ekesprimi sian opinion, Dave martele frapadis per "Kaj mi loĝas en Jorkŝiro, tio estas dekhora veturado. Se mi maltrafos mian vagonaron, ne utilos hejmeniri."

La ĉeestantoj, tiel incitite, rapidis esprimi sian opinion pri la konduto de la policisto, kaj konsilis al la maristoj, ke ili rapidu kaj kaptu la katon. Eble ili povos kapti la vagonaron. Unu proponis sian aŭtomobilon, kiu atendas ekstere.

Do, la kamaradoj ekkuris al la ŝipo. Ŝajne ili havis multe pli da sukceso ĉi tiun fojon ĉar post nelonga tempo ili reaperis kaj kure aliris la amason apud la elirejo.

La viroj laŭte aplaudis kaj salutis ilin, kaj incitis al rapideco. La junuloj rapidis tra la homamaso kaj esprimis sian dankon. La sinjoro, kiu proponis veturigi ilin, jam atendis kun la aŭtomobilo, kaj dum la policisto embarase rigardis alidirekten, ili enveturiliĝis kaj forrapidis.

Kiam ili sin trovis je kelka distanco for de la deĵorejo, la nova amiko ekridis. "Kiun stacidomon vi deziras?" li demandis.

La trio rigardis unu la alian.

Li daŭrigis. "Estis tre lerte farite. Mi devis helpi al vi. Nur, atendu ĝis la policisto ekscios! Ha! Ha! Ha! Oni priridos lin dum monatoj!"

Ĉiuj ekridegis. Fine, Jock malfermis la sakon kaj proponante diris, "Sinjoro, mi ne konas vin, sed vi estas bonegulo. Mi tre dankas vin. Ĉu vi prenos cigaron?"

(El *Virineto en bluo* de Mason Stuttard)

Represita kun la afabla permeso de
The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Alvoko

Konata fenomeno de la ĵurnalista mondo estas la institucio de inform-kolektado kaj -distribuado. Tiu sistemo fakte estas la bazo de gazeta inform-servado. Ĝis nun neniu serioza provo estas farita por ekspluati objekte la ekziston de la organizita Esperanto-movado por la perado de faktaj informoj. Ni jam posedas gazeton, kiu iras en 57 landojn kaj tial la rimedo por dissemo de informoj jam ekzistas. Necesas nur kolikti ilin kaj ordigi ilin.

Tia kolekto de informoj tamen postulas la kunlaboron de multaj simpatiantoj, praktikaj homoj, kiuj volos labori laŭ difinitaj instrukcioj.

Ni pensas ankaŭ pri la jam establita institucio, la opiniokontrolo, kiu estas tre populara afero en la postmilita mondo. Nia organizaĵo okupas unikan lokon por la takso de tendencoj, opinioj kaj fluoj sur grandaj terenoj de nia terglobo. Ni tial pripensas la kreon de novspeca informservo, kiu povos liveri al nia gazeto aktualan kaj altvaloran materialon, kiu havos intereson por la internacia legantaro kaj kiu liveros al niaj propagandistoj utilajn rimedojn por demonstracii al la ĝenerala publiko kaj la nacilingva gazetaro la oportunon de lingvo internacia.

Tiucele ni invitas seriozajn gesamideanojn anonci sin por kunlaboro. Ni bezonos nur kelkajn en ĉiu lando, kaj necesos nur, ke ili estu ordemaj kaj fidindaj kaj povu legi kaj skribi Esperanton sen peno. La taskoj ne estos malfacile plenumblaj kaj estos interesaj.

Interesatoj sin turnu al la Centra Oficejo de U.E.A. en Rickmansworth, Anglujo, kun indiko sur la koverto INFORM-SERVO. **Nepre ne sendu longan leteron.**



"Nu, Klarenco, eble vi finfine vidas la punkton! Se Esperanto estus instruita en la lernejoj de ĉiuj landoj ni nun estus povintaj akiri bieron!"

(Kliŝo afable pruntedonita de A. B. Morgan).

ESPERANTO KAJ RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 120, Heronsgate Road, Chorleywood, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri tiu rubriko

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	15.30-15.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	17.15-17.30	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions espérantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
	21.00-21.15	Praha. 49.92m. P.
Lundo	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.00-22.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan London de la monato).
	23.30-23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
Mardo	17.55-18.00	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Neungasse 28, Bern.
	18.50-19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	20.45-21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	21.00-21.10	Ostrava. 259m. Radiostacio Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato.)
Merkredo	10.15-10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10-21.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
	23.30-23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	17.45-18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očky vysilač, Hradec Králové Ĉeĥoslovakujo.
	17.45-18.00	Wien II. 31.05m., 41.81m. kaj 228.6m. K. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	17.55-18.00	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	21.00-21.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	18.50-19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	23.30-23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Sabato	12.00-12.15	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan sabaton.) Radio München, Kulturabteilung Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

KUDRA KAJ TRIKA TERMINARO

M. kaj V. Verda
9 pencoj aŭ 3 respondkuponoj
Mendu ĉe U.E.A.

ENIGMA KONKURSO N-ro 32

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Enigmo N-ro 69 : El la ĉi-subaj 128 silaboj formu 34 okliterajn vortojn, kies unuaj literoj formas proverbon.

a - a - a - a - a - a - a - a - ar - ar - blik - bu - bur - ci - ci - co - co - dak - den - di - di - dik - do - do - e - e - eks - fa - fo - ge - go - ĝis - ha - i - i - in - in - ka - ka - ka - ko - ko - ku - kul - la - lan - le - le - les - li - li - li - lik - lo - lu - mi - mi - mo - mor - na - ni - ni - ni - no - no - no - no - o - o - o - o - o - o - ob - ok - pen - plo - pos - re - re - re - re - ri - ri - ro - ro - ro - ro - se - se - ser - ser - si - si - si - si - stan - ste - ster - ŝo - ta - ta - ta - te - te - te - ter - ti - ti - to - to - to - to - to - to - to - to - trak - trep - tu - va - vak - van - var - vas - ven - ver - vi - zo.

Jen la signifoj de la vortoj : 1. propra al eklézio, kies estro estas la papo ; 2. eksciti la atenton de iu, donante al li profitan partoprenon en iu afero ; 3. blanka, tre malpeza metalo, kun arĝenta brilo ; 4. forte kaj brue skui la aeron, pro subita plivolumeniĝo de gaso ; 5. senpieda rampanta vertebrulo kun tre longa cilindroforma korpo ; 6. seĝeto sen dorsapogilo ; 7. flugmaŝino ; 8. speco de sturgo liveranta la plej bonan kaviaron ; 9. sovaĝa arbeto kun manĝeblaj nigraj beroj ; 10. plena simileco ; 11. ŝtono falinta sur la teron el la etera spaco ; 12. trinkaĵo farita el citrona suko, akvo kaj sukero ; 13. ŝtalgriza solida metaloido, kies komponaĵoj estas tre venenaj ; 14. ekstravagance komika ; 15. ŝirmilo por grava organo ; 16. neabsoluta, dependa, kompara ; 17. kliniĝanta for de la vertikala direkto ; 18. verko en kiu oni orde kaj metode traktas iun temon ; 19. aŭtoritato posedanta juĝan aŭ decidan povon ; 20. legoma vegetaĵo el familio de kompozitoj ; 21. kuracilo en formo de alkohola solvaĵo ; 22. ago por meti iun en sendanĝeran situacion ; 23. elektra aparato por transsendi voĉon ĝis granda distanco ; 24. malsano de novnaskitoj, kaŭzita de malordo en la nutrado ; 25. substanco uzata por fabriki kandelojn ; 26. fariĝis pli alta en temperaturo ; 27. kristaliĝanta laŭ la sama aŭ tre simila formo ; 28. neatendita kaj riska neordinara okazaĵo ; 29. decido de juĝantaro pri akuzito ; 30. homo, kiu publike forlasis sian religion ; 31. strat-lumigilo ; 32. rigardas ion kun daŭra atento ; 33. tuto de tiuj, kiuj redaktas gazeton ; 34. senkolora gaso nepre necesa por brulado.

Enigmo N-ro 70 : El la literoj de ĉiu oklitera vorto el la antaŭa enigmo formu kvinliteran vorton. La unuaj literoj de tiuj novaj vortoj formas ankaŭ proverbon. Jen mallongaj klarigoj pri la kvinliteraj vortoj : 1. fari bruon ; 2. prepozicio ; 3. militisto ; 4. ĵetbulo ; 5. monsumo ; 6. korpoparto ; 7. floro ; 8. superulo ; 9. popolo ; 10. loĝejo ; 11. organo ; 12. pinta ilo ; 13. produkti ; 14. el blanka malmola substanco ; 15. luma cirklo kiu ofte ĉirkaŭas astrojn ; 16. monavide ; 17. fari plafonon arkforma ; 18. nordpolusa ; 19. metalo ; 20. ornamaĵo ; 21. okulmembrano ; 22. bovego ; 23. gaso ; 24. larĝa streko ; 25. stelo ; 26. pagis ; 27. besto ; 28. organika teksaĵo ; 29. planto ; 30. ĝenerala nomo de pluraj mineraloj ; 31. kudrilego ; 32. vorto esprimanta agon ; 33. birdo ; 34. distingilo.

KIU ESTAS KIU

inter nord-amerikaj Esperantistoj
Biografioj kaj adresoj de multaj gesamideanoj en
Nord-Ameriko, kompilitaj de
F. A. POSTNIKOV.
2ŝ. 6p. aŭ 10 rpk, afrankite.
Mendu ĉe U.E.A.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 210

6an de Oktobro 1948

NOVAJ DELEGITOJ

Angolo

Benguela. FD (Farmacio) : J. M. Tocha, Despensário de Puericultura.
FD (Filatelo) : P. G. Almeida Lopes, Direcção Provincial de Fazenda, Caixa Postal 81.
FD (Juro) : A. B. Martins da Cruz, Caixa Postal 50.
FD (Meblo-industrio) : A. J. Pires, Caixa Postal 124.

Aŭstralio

Bogong. FD (Fotografio) : Frank Halls, Bogong, Via Wodonga, Vic.

Britujo

Chatham. D : E. R. Holt, 61 Albany Road.
Leeds. D : A. Thompson, 17 Crawshaw Gardens, Pudsey.

Finnlando

Heinola. D : H. Vihermä, Tiilitehtaankatu 18.
FD (Poŝto) : La D.
Nokia. D : F-ino M. Lehto, 10 piiri ; Koulu, Koskenmäki.

Germanujo

Dresden. D : K. Knoll, Dorotheenstr. 1, (10a) Dresden A 20. Tel : 46116.

Nederlando

Edam. D : C. Geurts, Voorhaven 80. Tel : 110.

Nov-Zelando

Pinehaven. D : D. MacGill, Wyndham Road, Pinehaven, Heretaunga, Wellington.

Polujo

Pruszcz Gdanski. D : S-ino H. Denenfeld, ul. Kopernika 22.

Usono

New York. FD (Fotografio) : H. R. Hansen, 92 Cannon St., New York 2.

ŜANĜOJ

Finnlando

Karstula. D : vakas.
Turku. FD (Poŝto) : vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948

339. F-ino E. Garraway, Brantford, Kanado.
340. F-ino M. E. Cooper, Morecambe, Anglujo.
341. S-ro Z. Bleszynski, Grodzisk Maz., Polujo.
342. F-ino S. Linnander, Stockholm, Svedujo.
343. S-ro E. Jacques, La Louvière, Belgujo.

DONACOJ. Y. C. Li 2ŝ. 6p., J. Vecsey 12ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 30a de Septembro 1948, kaj ankaŭ por komparo, je la fino de Septembro 1947 :

	1947	1948
Asociaj membroj ..	7107	9249
Individuaj membroj :		
MJ	1090	947
MA	5240	4478
MS	291	343
Patronoj ..	22	21
DM	150	171
HM	53	56
	6846	6016
	13953	15265

Voĉdonado pri la Statuto de UEA.

Printempo 1498

Ni, subskribintoj, deklaras ke ni kontrolis la voĉdonadon pri proponitaj aliigoj en la Statuto de U.E.A., kaj trovis la jenan rezulton :—

Art.	Por	Kontraŭ
3	12799	363
4-ii	5785	2118
6-ii	12798	348
8-i	12623	540
8-ii	12790	357
9 (b)	12817	346
10-i	2447	10475
10-ii	12815	348
11-i	11586	1050
11-iii	12827	336
13-i	12820	345
13-ii	12828	335
14-i	12364	796
14-ii	11860	774
14-iii	12822	341
15	12816	346
18	12831	337
25A	12498	665
25C	12808	355
26	12816	346
27-i	11665	1502
27-ii	11538	1608
27-iii	12583	581
27-iv	12818	345
28-i	12822	343
28-ii	12787	353
29	11650	1510
30-i	11554	1603
30-ii	12813	345
30-iii	12828	330
32	12552	612
35-i	11547	1611
35-ii	12805	351
35-iii	11638	348
37	12391	772
38-i	12810	354
39	12580	336

La nombro da voĉoj eblaj estis 15815, kaj sekve, laŭstatute ĉiu propono estas akceptita kun la escepto de tiuj rilate al Art. 4-ii kaj 10-i.

ARTHUR C. OLIVER, EILEEN OLIVER, M. STUTTARD, CECIL C. GOLDSMITH, K. E. TOFIELD.

La nova Statuto aperas en la dua parto de la Jarlibro 1948.

Ĉar evidentiĝis, ke estis iom da miskompreno rilate al la proponita teksto por Art. 4-ii, nova voĉdonado nun okazas pri tiu artikolo konforme al decido de la Komitato farita en Malmö.

Grava informo por Francoj. Ni devas informi al niaj francaj samideanoj, ke pro la kurzo-ŝanĝo anoncita je la 17-a de Septembro 1948 la kotizoj por 1949 estos MJ 250, MA 650, MS 1300, Patrono 6500 fr. fr. Tutpaĝa reklamo en la jarlibro kostos 4500 fr. kaj aparta abono al *Esperanto* 450 fr. Ĉi tiuj ciferoj anstataŭas tiujn montritajn en la dua parto de la 1948a jarlibro, jam presita.

Jarlibro. Ni antaŭvidas ke la dua parto de la jarlibro eliros en Oktobro. Se iu paĝinto ne ricevos ĝin li informu la Centran Oficejon.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario*

Italujo

Dum tri belaj tagoj de Septembro la 19-21, Torino gastigis la XXI-an nacian Kongreson de Esperanto. La honoran prezidantecon akceptis la urbestro D-ro Coggiola kaj honora membraro konsistis el la vicurbestro Hon. Casalini, urba fakestrino por instruado S-ino Pajetta, pluraj membroj de parlamento kaj diversaj kulturaj aŭtoritatuloj. Aliĝis 152 personoj el Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Anglujo, Rusujo krom, kompreneble, Italujo. La kunsidoj okazis en la luksaj salonoj de Palaco Carignano, kie Prof-ino C. Conterno, prezidanto de L.K.K. malfermis la kongreson. Post la inaŭguro oni akrame elektis Profesoron Canuto kongrespredikanto.

La kongreso estis grava por la Itala movado estante la unua tutlanda kongreso post la milito. Ĝi krome vekis multan atenton en oficialaj kaj kulturaj rondoj, kio donas la esperon, ke Esperanto trafos multe pli simpatian akcepton en tiuj medioj. Tre bonan materian subtenon donis al la kongreso la asekura entrepreno *Reale*.

La kongreso trafis bonan sukceson en la radio, kiu dissendis dekminutan intervjuon. Pri tio nepre skribu instigan leteron al: Direzione R.A.I., Sezione programmi, Via Arsenale, Torino.

Al la kongreso sendis saluton la Prezidanto de la Itala Respubliko, Luigi Einaudi kaj la Ministro pri Instruo.


Malá Učebnice Esperanta—Slovniček Espperantske-Cesky. Druhe Vydani pro mladéz napsala Julie Šupichová. 1948. 88p. 14×10 cm. Nakladatel Svatopluk Hrnčít, v Nymburce (Malgranda lernolibro por junularo, dua eldono). Prezo 18 Kčs.

Ĉi tiu lernolibro destinita al la junularo aperas duan fojon kun eldono de trimil ekzempleroj. La nomo de la verkintino garantias taŭgecon.

Ricevitaj : **Propogand-pakaĵo**, kun granda nacilingva afiŝo, glumarkoj kun propagand-tekstoj en Esperanto kaj Ĉeĥlingvo, kaj karto kun la tuta gramatiko. De Eldonejo Koro Esperanta, Bašty 6, Brno, Ĉeĥoslovakujo.

Escuela de Verano de Universidad de la Habana. Temaro de la lernejo kun indiko pri Esperantaj kursoj.

Ni (ne la fremdulaĵoj). 16-paĝa broŝureto kun ilustraĵoj. Instruo per ironio. Eld. G. Marin, "La Bosketo" Whiteway apud Stroup, Glos., Anglujo. 2 respondkuponoj.



34-a Universala Kongreso de Esperanto, Bournemouth, Anglujo, 6-13 Aŭgusto, 1949.

Tria Informilo

Limdato : Notu la jenan gravan informon pri aliĝoj al la Kongreso !

1. Ni akceptos kongresaliĝojn nur ĝis la 1-a de Julio, 1949.
2. Pro la neeblo akiri pli grandajn kunvenejoj, ni devas limigi la nombron de gekongresanoj al maksimume 2000, el kiuj ne pli ol duono estu Britoj.

Aliĝoj : Ĝis la 25-a de Oktobro aliĝis 293 personoj el 21 landoj laŭ la jena statistiko :

Argentino ..	1	Italujo ..	4
Aŭstralio ..	1	Jugoslavujo ..	3
Belgujo ..	4	Nederlando ..	6
Brazilo ..	1	Norvegujo ..	8
Britujo ..	195	Polujo ..	3
Bulgarujo ..	2	Portugalujo ..	1
Ĉeĥoslovakujo ..	6	Svedujo ..	28
Danujo ..	5	Svisujo ..	5
Finnujo ..	5	Usono ..	3
Francujo ..	10		
Germanujo ..	1		293
Hungarujo ..	1		

Adreso por leteroj : 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

Arabaj proverboj

Neniu malfeliĉo estas pli granda ol la propra.
Se Dio ne pardonas, la paradizo restus malplena.
Laboru kvazaŭ vi vivus eterne ; klopodu pri la alia mondo, kvazaŭ vi devus morti morgaŭ.
Antaŭ ol aĉeti domon, informiĝu pri la najbaroj.
La plej sankta milito estas tiu, kiun ni kondukas kontraŭ niaj propraj pasioj.
Memoru tion, ke je via naskiĝo ĉiuj ĝojis kaj nur vi ploris. Vivu tiel, ke je via morto ĉiuj ploros kaj nur vi ĝojis.

KOTIZOJ 1949

Lando		MJ	MA	MS	Pat.	Jarl.	Esp.	Valuto
Argentino	..	4	10	20	100	65	7	pesoj
Aŭstralio	..	5	12/6	25	125	80	8	angl. ŝil.
Aŭstrujo	..	10	25	50	250	160	20	sch.
Belgujo	..	45	112	225	1120	720	75	fr.
Brazilo	..	20	50	100	500	320	35	kru.
Britujo	..	15*	22/6*	35*	135*	80	8	ŝil.
Danujo	..	5	12.50	25	125	80	8	kr.
Finnlando	..	135	350	700	3500	2200	250	fmk.
Francujo	..	250	650	1300	6500	4500	450	fr.
Hungarujo	..	12	30	60	300	200	20	for.
Islando	..	6.50	16	32	160	105	10	kr.
Italujo	..	500	1250	2500	12500	8000	800	lir.
Jugoslavujo	..	50	125	250	1250	800	80	din.
Kanado	..	1.25	3	6	30	16	2	dol.
Nederlando	..	2.75	6.75	13.50	67.50	44	4.50	fl.
Norvegujo	..	5	12.50	25	125	80	8	kr.
Nov-Zelando	..	5	12/6	25	125	80	8	ŝil.
Palestino	..	250	625	1250	6250	4000	400	mil.
Polujo	..	125	300	500	3000	2000	225	zl.
Portugalujo	..	25	60	125	600	400	40	esk.
Svedujo	..	4	10	20	100	60	7	kr.
Svisujo	..	4.50	11	22	110	72	7.50	fr.
Urugvajo	..	2	4.50	9	45	30	3	pes.
Usono	..	1.25	3	6	30	16	2	dol.
Aliaj landoj	..	5	12.50	25	125	80	8	angl. ŝil.

* enhavas la kotizon al B.E.A.

Klarigoj

MJ=membro kun jarlibro.

MA= kun jarlibro kaj gazeto.

MS=Membro-subtenanto.

Pat.=Patrono.

Jarl.=prezo por tutpaĝa reklamo en la jarlibro. Duonpaĝa kaj kvaronpaĝa reklamoj kostas proporcie. *Entrepretoj* ne plu ekzistas.

Esp.=la kosto de aparta abono al *Esperanto* por tuta jaro.

Bonvolu pagi la kotizon al la kutima pagejo kiel eble plej frue.
Tio multe helpas al ni kaj evitos interrompon en la livero de la gazeto.

SEP VANGOFRAPOJ

de Karlo Aszlányi

El la hungara lingvo tradukis
Ladislao Spierer

148 paĝoj, 3ŝ. 3p. aŭ 13 rpk. afrankite.

“Altgrade rekomendinda aldonaĵo al nia populara literaturo, kiun devus posedi ĉiu humoramanta lernanto kaj lerninto de nia lingvo !”

Brita Esperantisto.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe U.E.A.

LA VIRINETO EN BLUO

kaj aliaj rakontoj

Originale verkitaj de Mason Stuttard

150 paĝoj, 3ŝ. 3p. aŭ 13 rpk. afrankite

“La stilo de la aŭtoro estas simpla, klara kaj viveca ; la lingvouzo bonega. Oni notas la modernan tendencon uzi mallongajn frazojn kaj simplajn verb-formojn. Aldonu al tio, ke neologismoj preskaŭ forestas kaj oni komprenos ke jen estas libro kiun spertulo legos kun ĝojo, kaj kiun komencanto legos sen tro multe da peno.”

Libera Tribuno.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe U.E.A.

ALEKSIS KIVI

SEP FRATOJ

Klasika verko el la fora nordlando.

Ekkonu la animon de la finna popolo per ĉi tiu bela traduko en vigla, kolorplena lingvo.

Romano kun la tuta ĉarmo de popolkanto.

360 paĝoj.

Prezo : bindita 16 ŝil. 6p., broŝ. 13 ŝil., afranko 6p.

Eldonita de

ELDONO VILHO SETÄLÄ, HELSINKI.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo